

La Riparado de Muro

(Mending Wall)

De Robert Frost

El la angla tradukis
James Alan Smith

Ekzistas io ne amanta muron,
sendanta infre frostan grundo-ŝvelon,
ŝutanta suprajn ŝtonojn en sunlumo,
faranta tiajn breĉojn ke eĉ du
personoj povus pasi flank-al-flanke.
Laboro de ĉasistoj malsimilas:
post ili venis mi kaj rekonstruis
kie neniu ŝton' sur ŝtono restis,
sed ili volis trovi la leporon
por la jelpantaj hundoj. Celas mi
la breĉojn ne viditajn dum farado,
kaj ne aŭditajn, sed dum la laboro
printemp-ripara jen ni ilin trovas.
Najbaron mian de trans la monteto
sciigas mi; kaj jen en unu tago
kunvenas ni por marŝi laŭ la limo
kaj meti muron inter ni denove.
La muro nin dividas dum ni iras.
Al ĉiu ŝtonoj kiuj al li falis.
Kaj kelkaj estas brikaj kaj aliaj

tiele preskaŭ bulaj ke nin devas
eldiri sorĉon por ekvilibriĝo:
“Ĉi tie restu ĝis ni deturniĝos!”
Ni malglatigas fingrojn per la ŝlifo
de ŝton-manipulado. Tio estas
alia speco de alfreska ludo
kun unu en team’, malmulte pli.
Kie ĝi staras ne necesas muro:
ĉe li nur pinoj kaj ĉe mi pomhorto.
Miaj pomarboj certe ne transiros
por manĝi la konusojn sub la pinoj,
al li mi diras. Li respondas nur,
“Bariloj bonaj—bonaj la najbaroj”.
Printempo min instigas al petolo
kaj mi scivolas ĉu mi povus meti
en lian kapon novan nocieton:
“*Kial* najbaroj bonas ĉe bariloj?
Ĉu tio ne validas pro bovinoj?
Sed tie ĉi bovinoj tute mankas.
Antaŭ ol fari muron mi demandus
kion mi mure tenos aŭ fortenos
kaj kiun per la faro mi ofendus?
Ekzistas io ne amanta muron,
volanta ĝin faligi”. Nu mi povus
sugesti al li “elfoj”, sed ne estas
precize elfoj kaj mi ja preferus
ke li eldiru ĝin. Mi vidas kiel

li alvenigas ŝtonoj ĉiu-mane
tenante ilin firme per la supro
kiel ŝton-sovaĝulo pra-armita.
Li iras en mallumo, al mi ŝajnas,
kaj ne nur de arbar' kaj arbaj ombroj.
Ne sondos li sentencon de la patro
kaj al li tiel plaĉas ke li pensis
pri tio ke li diras ĝin denove,
“Bariloj bonaj—bonaj la najbaroj”.

From “The Mending Wall” from THE POETRY OF ROBERT FROST edited by Edward
Connery Lathem, ©1969. Reprinted by permission of Henry Hold & Co., LLC.

(De “The Mending Wall” el THE POETRY OF ROBERT FROST redaktita de Edward Connery Lathem, © 1969.
Represita kun permeso de Henry Holt & Co., LLC.)